Ve! la demandoj estas preskaŭ rilataj al intelektaj kapabloj, ne al lingvaj konoj!!! Jen fakte neglektita sed kerna elemento en kiu ajn lern-aktiveco. Bone kompreni teknikajn tekstojn aŭ klare kaj detale esprimiĝi pri specifa temo ne dependas nur de lingvo-konoj sed plie de mensa kvociento, rezon-kapablo, "stilo" persona aŭ ŝablona en parolado aŭ interpretado... sen paroli pri spontanea/denaska/propra "(mal)facileco" koncerne al iu studo. Kaj nuntempe la plejmulto de la lingv-lernantoj deziras "bone paroli"... sed havas nenion por diri. Paroli iom jam sajnas al ili sufiĉe bone paroli --- Iel ni devas samtempe instigi, laŭeble, al plia evoluado KAJ respekti la limojn de ĉiu individuo. Do, ĉiam konscii pri la relativeco de taksadoj kaj testadoj (kaj de taŭgeco de metodoj/materialoj ktp). Eble la plej elstara manifestiĝo de konscio kaj memkonscio estas la ironio. Mi ironie atribuis 9-ojn al mi en ĉiuj kategorioj por la 3 lingvoj elektitaj. Ĉiu laŭ siaj kriterioj….Kaj laŭdire 10-oj estas destinitaj al dio. ;-)